FLUGOJ AL LA 95-A UK EN HAVANO

Cubana de Aviación kaj Copa Airlines estas la oficialaj flugkompanioj de la 95-a Universala Kongreso de Esperanto en Havano, Kubo.

Cubana de Aviación, 80-jara flugkompanio, ofertas al la kongresanoj malaltan tarifon por flugoj el 5 urboj el Eŭropo kaj 13 urboj el Ameriko. Sube estas la netaj prezoj kun interkrampe la aldono por la ceteraj impostoj laŭ la prezoj en decembro 2009 (*la impostoj varias laŭ la lando de la ekflugo kaj la momento de la aĉeto).

Ameriko:		**Eŭropo:**	
Meksiko	USD 210,00 (+ 126,84*)	Parizo	EUR 300,00 (+ 242,42*)
Cancun	USD 160,00 (+ 48,61*)	Madrido	EUR 390,00 (+ 289,75*)
Karakaso	USD 430,00 (+ 98,94*)	Londono	GBP 270,00 (+ 172,20*)
Panamo	USD 330,00 (+ 144,00*)	Romo	EUR 620,00 (+ 76,87*)
Montrealo	CAD 470,00 (+ 130,00*)	Moskvo	EUR 640,00 (+ 137,26*)
Toronto	CAD 470,00 (+ 133,25*)		
Bonaero	USD 580,00 (+ 204,00*)		

Cubana flugas ankaŭ el Santo Domingo USD 225,00 (+ impostoj); Bogota USD 319,00 (+ impostoj); San José USD 250,00 (+ impostoj); Guatemala USD 260,00 (+ impostoj); Montego Bay USD 345,00 (+ impostoj); Kingston USD 345,00 (+ impostoj).
Por ricevi la kongresan tarifon, bv. kontakti unu el la oficejoj de Cubana (listo ĉe http://www.cubana.cu/guide/?article=of_otros), menciante ke vi estas kongresano de la 95-a UK en Havano.
La biletoj aĉetitaj ne estas redoneblaj kaj ne eblas flugi per alia kompanio ol Cubana. La vojaĝo povas daŭri maksimume 21 tagojn ekde la unua flugo. La rezervoklaso devas esti H (sed P por Montrealo, Toronto kaj Moskvo; K pot Karakaso; R por Parizo).

La alia oficiala flugkompanio, Copa Airlines, flugas al 45 urboj el 24 amerikaj landoj. Ĝi ofertas rabaton de 15% je la publikaj tarifoj por flugoj el Centra kaj Suda Ameriko kaj Karibeo (rabatkodo C2843) kaj 20% por flugoj el Norda Ameriko (rabatkodo D2843). La kongresa rabato ne estas kombinebla kun alia(j) rabato(j) kaj validas de la 5-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto nur por flugoj de Copa (CM) kaj Aero República (CM*) al Havano en la rezervoklasoj S, I, Q, U, V, B, N, K, H kaj Y.
Por aĉeti la flugojn de Copa, bv. kontakti unu el ĝiaj oficejoj (listo ĉe http://www.copaair.com/html/user/default.aspx?pageid=72&lang=es) menciante la rabatkodon kaj ke vi estas partoprenanto de la 95-a UK.

La kompanioj povas peti pruvon de via kongresaneco.

Copa Airlines
copaair.com